# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

**N° 195 DECEMBRO 1997**

La numero : 10 FF Abono: 40 FF Kotizo: 20FF Sume: 60 FF

TRIMONATA BULTENO de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO ASOCIO
(Filio de I.K.U.E= Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista )
BULLETIN TRIMESTRIEL DE L'ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE
POUR L'ESPERANTO.

*** *Sankta* **PIO X**-*a, preĝu por ni.* ***



## Sommaire/*Enhavo*


| | Pages/*Paĝoj* |
|---|---|
| Le mot du président - *La bileto de la prezidanto* | 3 |
| Prière - *Preĝo* | 5 |
| 50-ème Congrès d'IKUE à Rome *50-a IKUE-Kongreso* | 7 |
| A travers le monde - *Tra la mondo* | 9 |
| *Commande Bible - Mendilo por Biblio* | 11 |
| Dans notre association *En nia asocio* | 15 |
| Boite aux lettres - *Leterkesto* | 18 |
| Anecdotes - Anekdotoj | 20 |
| Calendrier - *Kalendaro* | 21 |
| Annonces - *Anoncoj* | 22 |
| Abonnements - *Kotiztabelo* | 23 |


**ESPERANTO : INTERNACIA LINGVO**


Expéditeur/: Ass.Cath.Française pour l'espéranto
*Sendinto* 9,Rue Paul Doumer
F- 68920 WINTZENHEIM-COLMAR


**Motif de non distribution**

- ☐ Adresse insuffisante
- ☐ N'habite pas à l'adresse
- ☐ Refusé
- ☐ Autres

Périodique Semi-routé

**PORT PAYE**

COLMAR (68)

Jen,tradukita en Esperanton, kaj eldonita de la Franca Katolika Esperanto Asocio, la eta Biblio por infanoj, kreita de la Katolika Internacia Organizo 'Helpo al la Mizerega Eklezio' en 1979.Jam, 30 milionoj da ekzempleroj estis disdonitaj tra la tuta mondo pere de pli ol 100 lingvoj. Mankis Esperanto, kaj nun estas tio farita !
Aĉetu ĝin ! (Vidu p.11-12)

L'esperanto. Face aux problèmes linguistiques, une langue neutre vraiment internationale pour les contacts directs d'homme à homme.

Ĉiujn artikolojn oni rajtas reprodukti kondiĉe ke estu citata la fonto.Specimenon kun represo aŭ tradukado oni sendu al la redaktoro.

La materialon por la bulteno oni sendu al la redakcio nepre antaŭ la 20.a de februaro,majo,aŭgusto kaj novembro.

Finpresado la 24/12/1997

*FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO*

**Nro 195 Decembro 1997**

Trimonata eldonaĵo de Franca Katolika Esperanto Asocio (Association Catholique Française d'Esperanto A.C.F.E )
CCP : 2 324 93 N Rouen

Prezidanto:
S-ro A. BESSIERE
28,Rue C St-Saëns
76000 ROUEN
Sekretario:
F-ino A.M CHANEY
56,Rue Corvisart
75013 PARIS
Kasisto :
S-ro G.VILLENEUVE
14,Rue Clair de Lune
91530 SAINT-CHERON
Religia Konsilanto :
P-ro L.BOURDON
7,Av. Salomon
59800 LILLE
Peranto IKUE:
S-ro M.COLLEU
95,Rue Victor Hugo
80440 BOVES
Redakcio :
Fam.BASSO-RESCIO
9,Rue Paul Doumer
68920 WINTZENHEIM
Fakse 0389794333
Rete 100623,3022@Compuserve.com



# Le Mot du Président

Sans vouloir trop revenir sur l'année qui s'achève,je voudrais vous rappeler le 50.ème congrès international des espérantistes catholiques qui s'est tenu à Rome et Rimini au début du mois de septembre dernier et a réuni plus de 300 participants dans l'amitié et la confiance en l'avenir. Notre mouvement est donc bien vivant. Nous devons nous en réjouir et puiser dans cet événement la force de poursuivre notre tâche.

L'année 1998 sera elle aussi riche de manifestations espérantistes qui auront lieu dans notre propre pays.

Fin juillet se tiendra à Nantes le 13ème congrès oecuménique espérantiste pour rappeler le 4ème centenaire de l'Edit de Nantes. Tous ceux qui ont pris part à de tels congrès savent combien leur athmosphère est chaleureuse et combien ils contribuent à l'amitié entre chrétiens de sensibilités diverses et favorisent la connaissance et le respect entre catholiques et protestants. C'est pourquoi j'invite tous ceux qui le pourront à participer à un tel congrès qui aura sans aucun doute le même succès que celui de Viviers en 1993.

Ensuite ce sera du 1 au 6 août 1998 le grand congrès universel d'esperanto à Montpellier, lequel réunira dans la capitale du Languedoc-Rousillon des milliers d'espérantistes venus des quatre coins de l'horizon. Nul doute que ce congrès montrera la vigueur et l'enthousiasme de ceux qui partagent notre idéal au public français. Là aussi nos membres auront à coeur d'être présents.

En 1998 notre mouvement aura beaucoup à faire et nous ne devrons pas ménager nos efforts.

A tous donc bonne et heureuse anée 1998.

# La Bileto de la Prezidanto

Sen tro reekzameni la finiĝantan jaron, mi volus rememorigi al vi la 50-an internacian kongreson de la esperantistaj katolikoj, okazinta en Romo kaj Rimini komence de septembro 1997,kiu akceptis pli ol 300 partoprenintojn, en amikeco kaj fido en la estonteco. Nia movado estas do vigla. Ni rajtas ĝoji pro tio kaj ĉerpi en tiu okazo la forton por daŭrigi nian taskon.

La jaro 1998 estos ankaŭ fekunda je esperantistaj manifestacioj, kiuj okazos en nia propra lando.

Fine de julio okazos en Nantes la 13-a ekumena E-kongreso por rememorigi la 4-an centdatrevenon de la proklamado de la Edikto de Nantes. Kiuj jam partoprenis similajn kongresojn, tiuj scias kiel ilia etoso estas varmkoriga kaj kiamaniere ili kontribuas al amikeco inter kristanoj de diversaj sentemoj kaj favorigas la ekkonon kaj respekton inter katolikoj kaj protestantoj. Tial mi invitas ĉiujn, kiuj povos, partopreni tian kongreson, kiu sendube estos tiel sukcesa, kiel tiu en Viviers en 1993.

Poste okazos de la 1-a ĝis la 6-a de aŭgusto la grava universala kongreso en Montpellier, liu kunvenigos en la ĉefurbo de Landvedoko-Rusiljono milojn da esperantistoj el la kvar horizontanguloj. Sendube tiu kongreso konigos al la franca publiko la viglecon kaj entuziasmon de la partoprenantoj en nia idealo. Niaj membroj volonte ĉeestos ĝin.

En 1998 nia movado havos multajn farendaĵojn kaj ni devos ne ŝpari niajn klopodojn.

Al vi ĉiuj do bonan kaj feliĉan novjaron 1998.



## La ofero de mi mem kiel brulofera viktimo al la mizerikorda Amo de la Bona Dio.


*Sankta Tereza de Jesuo Infano tage kaj nokte portis sur sia koro tiun oferon en la libro de la Sanktaj Evangelioj.*

Ho mia Dio, beata Triunuo, mi deziras ami Vin kaj Vin amigi, labori por la gloro de la Sankta Eklezio,savante la animojn, kiuj estas sur la tero kaj liberigante tiujn, kiuj suferas en la Purgatorio - Mi deziras tute plenumi volon Vian kaj atingi la gloran gradon, kiun Vi preparis por mi en Via Regno, unuvorte: mi deziras esti sankta, sed mi sentas mian senpovon kaj mi Vin petas , ho mia Dio, estu mem mia Sankteco.

Vi tiel amis min, ke Vi donis al mi Vian solan Filon por esti mia Savanto kaj mia Edzo, kaj la trezoroj senlimaj de Liaj meritoj estas miaj - mi ilin oferas al Vi feliĉe, Vin petegante min rigardi nur tra la Jesua Vizaĝo kaj en Lia Koro brulanta de Amo.

Mi ankaŭ oferas al Vi ĉiujn meritojn de la Sanktuloj, kiuj estas en la ĉielo kaj sur la tero, iliajn amagojn kaj tiujn de la Sanktaj Anĝeloj; fine mi oferas al Vi, ho beata Triunuo, la Amon kaj la meritojn de la Sankta Virgulino, mia Karega Patrino; al Ŝi mi forlasas mian oferon, Ŝin petante prezenti ĝin al Vi.

Ŝia Dia Filo, mia Karega Edzo, en la tagoj de sia mortema vivo,



El bildkarto sendita de Pastro Majorel (Kita -Malio)

diris al ni: "Ĉio, kion vi petos de Mia Patro en Mia Nomo, Li ĝin al vi donos " - Mi do certa estas, ke vi plenumos niajn dezirojn ... Mi scias, ho mia Dio, ke "ju pli Vi volas doni, des pli Vi dezirigas".

Mi sentas en mia Koro vastegajn dezirojn kaj plenfide mi petas, ke Vi ekposedu mian animon- Ha ! mi ne povas ricevi la Sanktan Komunion tiel ofte kiel mi deziras; sed, Sinjoro, ĉu vi ne estas la Plejpotenca ? Loĝu en mi kiel en Tabernaklo,neniam foriĝu de Via malgranda hostio.

Mi volus Vin konsoli pri la maldanko de la malbonuloj kaj mi Vin petegas, forigu el mi la liberecon malplaĉe al Vi. Se , pro malforteco, mi kelkafoje falas, tuj Via Dia Rigardo purigu mian animon, konsumante ĉiujn miajn malperfektaĵojn,kiel la fajro, kiu ŝanĝas ĉion en sin mem. Mi Vin dankas , ho mia Dio, pro ĉiuj gracoj,kiujn vi al mi donacis, speciale pro mia trapaso tra la sufera fandujo. Gaje mi kontemplados Vin en la fina tago, portante la krucan Sceptron, ĉar Vi bonvole dispartigis Kun mi tiun Krucon altvaloregan. Mi esperas, ke en la ĉielo mi similos vin kaj vidos sur mia Korpo glorigita speguliĝi la Sanktajn stigmatojn de Via Pasiono.

Post la surtera ekziliĝo, mi esperas iri Vin ĝui en la Patrio, sed mi ne volas amasigi meritojn por la ĉielo, mi volas labori por Via sola Amo, kun la ununura celo plaĉi al Vi, konsoli Vian Sanktan Koron kaj savi animojn, kiuj Vin eterne amos.

Vespere de tiu vivo, mi aperos antaŭ Vi kun malplenaj manoj, ĉar mi ne petas , Sinjoro, ke vi nombru miajn ellaboraĵojn. " Ĉiuj niaj justecoj estas makulataj antaŭ Okuloj Viaj "

Mi do volas surmeti Vian propran Justecon, kaj ricevi el Via Amo la eternan posedon de vi mem. Mi tute ne volas alian tronon kaj alian kronon krom vi, ho mia Amato.

Antaŭ viaj okuloj, la tempo estas nenio - unu sola tago estas same kiel mil jaroj - vi do povas tuj nin prepari por aperi antaŭ Vi.

Por vivi en ago de Perfekta Amo, mi oferas min al Vi, kiel bruloferan Viktimon al via Mizerikorda Amo, petante Vin min konsumi senfine, lasante elflui en mian animon la fluojn de senlima amemo fermiĝintajn en Vi, kaj ke tiel mi fariĝu martiro de via Amo, ho mia Dio !

Tiu Martirigo, post mia preparo al apero antaŭ Vi, min fine mortigu kaj mia animo fruege lanĉiĝu en la eternan brulegon de via Mizerikorda Amo.

Mi volas , ho mia Amato, je ĉiu pulso de mia koro, renovigi al Vi tiun oferon sennombrafoje, ĝis kiam,post eliro el la ombroj, mi ekpovos senfine rediri al vi mian amon starante antaŭ via vizaĝo.

En la Festo de la Sankta Triunuo la 9an de Junio 1895.

(tradukis Fratino PAIN).




## 50-A IKUE-Kongreso en Romo-Rimini

Detalan raporton pri la 50-a IKUE-kongreso vi legos sur Espero Katolika. Hodiaŭ mi deziras nur reliefigi la ĉefajn punktojn, kiuj karakterizas tiun sukcesplenan kongreson.

Unue ĝi estis amplekas, ĉar la nombro de la partoprenintoj superpasis 300 personojn, venintajn el 22 landoj. La poloj kaj la ĉekoj estis la plej multnombraj, sed estis tamen vera internacieco, ĉar venis malajzianino,brazilanoj, ruandanino kaj du orientaj pastroj el Ukrajno kaj Rumanujo. La etoso estis do tre internacia kaj frata kiel kutime.

Kio tre forte ĝojigis ĉiujn, tio estis la forta partopreno de multaj junuloj, kiuj alportis al la kongreso entuziasmon kaj fidon al la estonteco. Oni povas esperi, ke la junulara sekcio de IKUE progresos kaj aktivos por la plej bona evoluo de nia movado.

La tagaj liturgioj donis imponan ideon de nia katolikismo. Dank'al la zorge eldonita meslibreto fare de Pastro Eichkorn kaj al la taùga elekto de la kantoj, ĉiu povis manifestacii sian kredon kaj facile partopreni en la bela kantado de la himnoj kaj preĝoj; ĉie la lokaj pastroj tutafable akceptis kaj salutis nin. Tutspeciale menciinda estas la ĉeesto de la episkopo de San Marino en sia katedralo disponigita por nia diservo.
Sed la plej emociigaj momentoj estis la aùdiencoj ĉe la Papo kaj la itala respublika prezidento. (Esc. Luigi Scalfaro) . Ni ja partoprenis, kun multaj pilgrimantoj, en la merkreda ĝenerala aùdienco de la Papo sur placo Sankta Petro. La Papo salutis nin en esperanto kaj ankaù aldonis prediketon en la internacia lingvo ! Nia ĉeesto estis ankoraùfoje menciita , kiam oni prezentis itallingve la diversajn italajn pilgrimantojn.
Poste en palaco Quirinale la itala respublikprezidento tre afable akceptis nian tutan kongresanaron kaj emfazis la utilecon de esperanto kaj ties internan ideon de interfrateco kaj amikeco.
Sendube la 50-a kongreso restos; en niaj memoroj kaj en la historio de IKUE.




Ilustraĵo el la libro "Dio parolas al siaj infanoj " P.51 Jesuo naskiĝas en Bet-Lehem



## TRA LA MONDO :

Dum la ĝenerala aùdienco en Placo Sankta Petro de merkredo la 3an de septembro 1997, Papo Johano Paùlo la 2-a adresis sin en esperanto al la kongresanoj per la vortoj :
" Mi ĝojas bonvenigi la responsulojn de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista, engaĝitajn en sia kvindeka Kongreso. Karegaj, la temo de via renkonto reprenas la misian taskon konfiditan de Kristo al sia Eklezio. Akceptu ĝin malavare kun tiu spirito de universaleco, kiu estas ĉe la bazo de la lingvo kiun vi kulturas . "

FELIĈAN
NOVAN
JARON




Via redaktoro

## AUSKULTU VATIKANAN RADION

Elsendoj en **Esperanto** :

DIMANĈE - Horo 21.20 laŭ mezeŭropa tempo (10')

Mezonde :527 kaj 1530 kHz Kurtonde 4005(74.90 m),5880 (51.0m)
Satelite : Eutelsat II-F1,13 E 10.987 GHz,transponder 25,
Video NBC S,subportanto 7.39 MHz FM,Panda 1,Vert.Polar.

MERKREDE : Horo 21.20 laŭ mezeŭropa tempo (14')

Mezonde 1611 kHz,Kurtonde 6185(48.50m),7365(40.73m)

**Kaj skribu al : Radio-Vatikana - Esperanto Redakcio**
**SCV-00120 CITTA del VATIKANO**
**http://www.wrn.org/vatican-radio/**

**POLA RADIO** :Elsendoj en esperanto ĉiu-tage !

15h30 31,50m;41,18m;41,99m;50,00m(9525,7285,7145,6000kHz)
22h30 41,27m;49,71m;49,22m (7270,6035,6095 kHz)
Per satelito: Eutelsat II F-3-16 gr. orienta lat., 11.080 GHz H
Subportanto 7,38 MHz . Ĉiutage : 06h30 - 15h30 kaj 20h00
Pola Radio-Esperanto Redakcio PF 46 PL-00977 VARSOVIO

Radio Pollando tra INTERNET ĉiu-tage post la 14a30 dum 4 minutoj ĉe :http://www.wrn.org/stations/poland.html

## LA MORTOTUKO

signo de nia epoko
EVANGELIO VERKITA PER LA SANGO
Dokumenta Filmo - Daŭro 55 minutoj , kolora vidkasedo, Versio en esperanto - Financis IKUE
Prezo: 180 FF +sendokostoj



## DIO PAROLAS AL SIAJ INFANOJ

BIBLIO POR INFANOJ

(12x19 cm - 96 paĝoj kun koloraj ilustraĵoj)

Laste aperis, tradukita en Esperanton, kaj eldonita de la Franca Katolika Esperanto Asocio, (F.K.E.A), tiu eta Biblio por infanoj - kaj ankaŭ por plenkreskuloj - kreita de la Katolika Internacia Organizo "Helpo al la Mizerega Eklezio", en 1979.
Jam 30 milionoj da ekzempleroj estis disdonitaj tra la tuta mondo pere de pli ol 100 lingvoj. Mankis Esperanto, kaj nun tio estas farita !
Laŭ la principoj de tiu agado, tiuj Biblioj devas esti donacitaj senpage al tiuj kiuj ne povas pagi, kaj pagitaj de tiuj kiuj povas.
Tial, tiu Esperanta eldono, financita de F.K.E.A , nepriĝas , kontribuon de la pagipovantoj.
Tiel , ĉiu paganto ebligos la distribuon de tiu valora, kaj bele aspekta Biblio, tra la tuta Esperanta Mondo, kaj, se necese, la presaĵon de pliaj ekzempleroj.

DANKON AL ĈIUJ.

*Franca Katolika Esperanto Asocio*

VENDKONDIĈOJ:

POR LA LIBROJ: Minimume , **30** Frankoj poekzemplere
**25** FF ekde 3 ekzempleroj,
aŭ egalvaloro en alia mono.

POR LA SENDOKOSTOJ : 20% por Eŭropo -
30% por la aliaj kontinentoj.
Minimumo de 10 FF por ĉiu sendo.
Procentoj validaj nur ĝis sendo de 10 ekz.
(Ekde 11 ekz. petu de la peranto la ĝustan sendokoston.)

PERANTO de tiu agado : Sinjoro Roger PONS
3,Rue du 8 Mai 1945
F-87510 NIEUL Francio

PAGO: Je la nomo de S-ro PONS ,
pere de - Poŝtĉekkonto LIMOGES 3 644 92 N
- aŭ UEA-konto : rogp-s ĉe UEA
- aŭ alimaniere (precizigota)

-------------------**MENDILO**---------(forstreku la neutilaĵojn)-------

S-ro/S-ino/F-ino ..........................................................

Adreso : ..........................................................

..........................................................

**MENDAS** de Sinjoro PONS 3,Rue du 8 Mai 1945
F-87510 NIEUL

......... **ekzemplero(j)n** de la suprecitita Biblio

**PAGAS** je lia nomo : al Poŝtĉekkonto LIMOGES 3 644 92 N
al la konto rogp-s ĉe UEA
alimaniere ..........................................

Por UNU libro (30 FF
+ sendkosto por Eŭropo 10 FF )= 40 FF ..........FF

Por DU libroj (60 FF
+ sendkosto por Eŭropo 12 FF )= 72 FF ..........FF

Por pli ol TRI libroj : Nombro : ....... x 25 FF = ..........FF
sendkostoj (20% por Eŭropo
/ 30 % por aliaj kontinentoj) ..........FF

ENTUTE = ..........FF

Dato: Subskribo:

**13-a EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO**

# NANTES (Rezé)

# 25-07/01-08-1998

# ALIĜILO

**Nomo:**
**Adreso:**

**Lando:**
**Tel:**
**Fakso:**
**Elektronika adreso:**
**KELI-ano/IKUE-ano**

**Dato,horo kaj rimedo de alveno:**
**Dato,horo kaj rimedo de foriro**

**Mi akceptas/ ne akceptas dividi la dormoĉambron.**
**Mi deziras kiel kunĉambranon:**
**Mi manĝas/ ne manĝas vegetarane.**
**Mi havas / ne havas alian specifan dieton (indiku).**
**Mi kantos / ne kantos en la ĥoro: base /tenore/ alde/ soprane.**
**Mi pretas / ne pretas proponi prelegon /**
**...........................**

**Mi pagas la tutan kotizon (laŭ la landa tarifo) / la garantian sumon per poŝta ĝiro al la poŝta konto de FEEL,** (interbanka kodo 30041-00001-1045615U020-63 ) aŭ al la konto **ekef-k** de Ekumena Kongreso Francio ĉe UEA.

Tiun aliĝilon, vi sendu al **Philippe Cousson, 26 rue de Pré Ventenet, F-86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio** per poŝto, aŭ per elektronika mesaĝo al <diaregno@altern.com>, samtempe pagante la indikitan sumon. Vi finpagu tuj ĉe alveno en la kongresejo.

Kotizoj :

Por ĉiu : garantia sumo : 200 FRF (parto de la kongresa kotizo)
Por loĝantoj el "eks-socialismaj landoj" : kongresa kotizo : 800 FRF
Por aliaj : kongresa kotizo : 1600 FRF.

Nantes estas atingebla per trajno (rapida), per aviadilo, per internacia buslinio, per aŭtoŝoseo. Pli precizaj sciigoj venos poste por aliĝintoj.



# EN NIA ASOCIO

Novaj membroj :

01/ Fratino PAIN Marie-Rose (Vendée)

**Bonvenon** al la novulino !

## PROTOKOLO DE LA KOMITATKUNVENO DE LA 22-a de OKTOBRO 1997.

Ĉeestis: S-ro Bessière,F-inoj Chaney kaj Michel, Pastro Bourdon,S-roj Colleu, Despiney, Lafargue, Pons kaj Villeneuve,F-to Marmou.

Petis senkulpigon: S-ino Lafargue, S-ro Basso

observis: Pastro Héroux.

Post konstato, ke la kongreso en La Houssaye en Brie estis sukcesa, S-ro Villeneuve prezentas la financan situacion; ĝi pliboniĝis dank'al la leteroj senditaj al la forgesemuloj pri la kotizo.

Nia asocio ricevis leteron de S-ro Centassi , kiu intencas eldoni libron pri la katolika esperantista movado. Ni deziras bonan sukceson al tiu venonta eldonaĵo kaj helpos s-ron Centassi kiel eble plej bone.

Kun granda malĝojo la komitato eksciis pri la forpaso de s-ro Bernard, fervora esperantisto kaj membro de tre longe de nia asocio. La prezidanto sendis al la familianoj siajn kondolencojn.

Oni planas eldonon de libreto, kun la mesteksto kaj kelkaj kantoj. Oni uzos tiun libreton okaze de niaj kongresoj diservoj. S-roj Bessière kaj Colleu prizorgos la aferon.

La preparo de la ekumena kongreso en Nantes bone progresas. Pastro Girault kaj S-ro Cousson (el KELI) kune vizitos la urbon Nantes fine de novembro por prepari surloke

la organizadon de la kongreso. La ĝenerala kunveno de nia asocio okazos en la kadro de la kongreso.

En Montpellier , dank'al la laboro de s-ino Tora, la episkopo jam donis la permeson pri ekumena diservo. La tekston preparos Pastro Girault kaj S-roj Bessière kaj Cousson en januaro dum kunveno en Poitiers.

La komitato decidis, ke ni pilgrimos al Lourdes en 1999. S-ro Colleu informiĝos pri taŭga hotelo.

En 1998 finiĝos la mandatoj de la komitatanoj Marmou,Colleu,Pons kaj Villeneuve. Ili ĉiuj rekandidatiĝos. Aliaj kandidatoj anoncu sin ĉe la prezidanto, kiel eble plej rapide.

S-ro Bessière raportis pri la 50-a kongreso de IKUE en Romo-Rimini. Vi legos tiun raporton aparte.

S-ro Pons prezentis la ĵus eldonitan libreton "Dio parolas al siaj infanoj" kaj donis informojn pri ĝiaj vendado kaj dissendo.

La venonta komitatkunveno okazos en Parizo la merkredon 28-an de januaro 1998.

Finfine la prezidanto legis leteron de la urbestro en Villandry, kiu informas, ke la komunumo restaŭros la tabulon fiksitan sur la naskiĝdomo de Pastro Peltier, nia fondinto. La prezidanto skribos dankleteron al la urbestro.

## Ni funebras kaj kondolencas .

**Forlasis nin ĉi tiuj niaj gefratoj :**

**- S-ino LE COGUIEC Raymonde**
en Arradon (56)

**-S-ro PERDRAUD Roland**
en Libourne (33)

***Al la familioj, sincerajn kondolencojn. Ni preĝu por la ripozo de la animoj de tiuj karaj amikoj kaj gefratoj en Kristo.***



Ĉi-sube vi povas legi leteron de la urbestro de Villandry (Indre-et-Loire) al S-ro Raymond Boré , Chambery .

<< Villandry,le 29 Septembre 1997

Monsieur,

En réponse à votre dernier courrier, j'ai l'honneur de vous informer que j'ai formulé votre souhait au Conseil Municipal le 12 septembre.


Il s'est montré très favorable au remplacement des plaques actuelles et vous remercie de la biographie que vous nous avez adressée sur ce natif de notre village.

La dépense pour le remplacement des deux plaques qui porteront la mention supplémentaire 1870-1909 "Pionnier de l'Esperanto", sera prise en charge par la Commune.

Elles seront installés dès livraison (la commande a eu lieu ce jour), et nous espérons simplement que les véhicules de fort tonnage ne les dégradent pas à nouveau.

Je vous prie d'agréer,Monsieur, l'expression de mes salutations distinguées.

André BARNIER
Maire >>



La Preĝo PATRO NIA
en esperanto en preĝejo
de Jerusalemo -Israelo

# LETERKESTO

El Ĉeĥa IKUE-Sekcio !

Antaŭe akceptu miajn plejkorajn kaj sincerajn salutojn. Post pli longa tempo mi trovas momenton, kiam mi povas skribi leteron.Ĉi-jare mi partoprenis Eŭropan ekumenan kunvenon en Graz, poste nian 50-an IKUE-kongreson en Italio kaj krome ankaŭ mi instruis Esperanton en nia somera tendaro. Mia funkcio de IKUE-estrarano zorganta pri reto de landaj reprezentantoj postulas kompreneble ankaŭ tempon; kaj kie estas aliaj devoj - familiaj,laboraj, ktp ?

Mi estas dankema pro via bele kaj rapide farita flugfolio pri nia IKUE-movado, kiun vi tradukis en francan lingvon. Oni povas uzadi ĝin por informado ne nur en eŭropaj franclingvaj landoj, sed ankaŭ en afrikaj kaj aliaj, kie oni parolas ankaŭ france, (Belgio, Svislando, Kanado, Madagaskaro, Togolando, Konga Respubliko,...). Se vi havas tie kontaktojn kun esperantistoj. Estas ja necese ekspliki al adresontoj, kion fari, t.e havigi kopiojn kaj dissendi ilin ĉien, kie tio estas taŭga ( al esperantistoj, pastroj, episkopoj, seminarioj,katolikaj lernejoj, gazetoj ktp. ) Bedaŭrinde ĝisnuna propagando tute ne sufiĉas. Mi havas bonajn spertojn pri publikigo de niaj afiŝoj en informaj kestetoj de preĝejoj. Ni organizas skribajn kursojn de E. kaj pere de tiuj publikigoj jam aliĝis kelkaj junaj homoj. Ĉu ankaŭ vi uzis niajn materialojn efike en Francio ?

Nun mi havas ankoraŭ jenan peton . Franca prezidanto Jacques Chirac dum sia vizito de Azio parolis pri lingva situacio en la mondo, kiam oni uzas ĉiam pli kaj pli nur unu lingvon - la anglan kaj proponis preferon de la franca krom ĝi. Li anoncis projekton pri apogo de la franca kaj promesis doni por tiu celo 7 milionojn da dolaroj. Ĉi-tiu sciigo estis interesa



por mi kaj kompreneble por esperantistoj ĝenerale, ĉar ni tre bone sentas nesanan lingvan evoluon en la mondo. Do, mi tre urĝe volus vin peti, se vi havus eblon akiri pli detalajn informojn tiurilate.

Mi strebas jam kelkajn jarojn pri ekekzisto de iu lernejo,kie oni povus studi fremdajn lingvojn, inter kiuj estus ankaŭ Esperanto. Por tiu celo oni povas gajni grandan domegon de iama monaĥejo, nun kiel havaĵo de nia ŝtato. Oni nur serĉas organizaĵon, kiu havas monon kaj volus en nia lando profesii lernejan aŭ kulturan agadon. La domaro estas malplena kaj bezonas nun profesian organizaĵon. Post aŭdo de vortoj de la prezidanto Chirac mi ekĝojiĝis, ĉar mi tuj sopiris pri fondo de iu franca instituto, ĉe kies naskiĝo povus stari kredantaj esperantistoj. Ne opiniu ke tio devas esti nur fantazio, mi havas bonajn kontaktojn kun oficejo, kiu zorgas pri la monaĥejo kaj mi povas peti pri helpo nian ministron de kulturo, mian amikon.Li havas ankaŭ intereson pri kvalita enhavo de la monaĥejo, elstara kultura arkitektura memoraĵo... Mi petas , havigu afable bazajn informojn, kiu povas diri al ni ion pli precizan pri konkretaj planoj de la franca prezidento.Dankon por via helpo kaj komprenemo.

Frate kun saluto. DIO BENU !

Inĝ. Jan KALNY
Libuŝina 8
CZ- 37006 České Budejovice

Esperanto el Zambio :

Estas kun ĝojo ke mi skribas al vi tiun-ĉi leteron . Mi bone fartas kaj esperas ke estas same por vi kaj via familio. Mi ricevis vian adreson el Sac. Duilio Magnani kun kiu mi tre longe korespondis kaj diskutis pri miaj studoj, kiujn mi

preferas daùrigi en francaj landoj ĉar mi scipovas la francan,anglan,esperantan kaj portugalan lingvojn (Mi estas zairano). Sac.Magnani diris al mi ke la franca-IKUE-sekcio pli bone povos prizorgi la aferon. Pro tio , mi esperas ke mi baldaù ricevos de vi tre pozitivan respondon. Ĉu eblas sendi al mi la freŝan numeron de la revuo Franca Katolika E-isto ? Mi estas katolika kaj mi ege deziras korespondi kun katolikoj el diversaj landoj (en esperanto, france , ...), tiam se estas ebla, bonvolu transdoni mian adreson al katolikaj organizadoj (gesamideanoj aù ne) de Belgio kaj Francio. Mi estas certa ke kun la Franca-IKUE-Sekcio, mia problemo estos solvita kaj mi baldaù studos en Universitato kie oni instruas france.

Mi plej sincere salutas vin, gesamideanojn, gefratojn en Virgulino Maria zorganta pri la Franca IKUE-Sekcio .

Kapinga Ntumba
c/o Sro Della Bannon
St Mary's Mission
PO BOX 110239 SOLWEZI
( ZAMBIO)



## ANEKDOTOJ

Junulo intencas fariĝi profesia maristo .
Li do sin prezentas al la Rekrutejo .
Rekrutisto: Bone ! ĉu vi scipovas naĝi ?
Junulo : Ne . Sed kial ? ĉu vi ne plu havas ŝipojn ?

( G-Zarca -Nice)



## KALENDARO

1998

28/01 PARIZO
Generala Komitatkunveno.

18/07 SEBRANICE ( Ĉehio)
ĝis 17-an IKUE-Tendaro (nur 350 FF por gejunuloj )
01/08 inkluzive manĝoj,loĝado en tendo . !

25/07 NANTES
ĝis EKUMENA KONGRESO (Vidu aliĝilon)
01/08

01/08 MONTPELLIER
ĝis UNIVERSALA KONGRESO
08/08

10/08 TAIZE
ĝis JUNUKARA EKUMENA TENDARO
16/08 kun komuna lernado de esperanto

04/09 ARENZANO (Genova - Italio)
ĝis 12-a Kongreso de Italaj Katolikaj
08/09 Esperantistoj

Poŝtmarko de Litovio
ricevita de Algis K.
kun la bondeziroj .
Koran Dankon !

